

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 19/12/2019 Kvarcentkvindeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **779,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **289,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **266,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **224,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.99



La Objekto do dependas de tri specoj de verbo: ĉe la unua la Objekto estas necesa, ĉe la dua la Objekto estas ebla, kaj ĉe la tria la Objekto ne eblas. La verbojn de la unuaj du specoj oni nomas Transitivaj Verboj, kaj la verboj de la tria speco nomiĝas Netransitivaj Verboj. Pri ĉiu speco oni devas lerni, se oni ankoraŭ ne scias, de kiu speco estas ĉiu verbo. Zamenhof intencis, unuigi ĉiujn verbojn en unu klason de transitivaj verboj, sed ĉar preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj havas la dividon, li rezignis pri tio. Tial ni ĉiuj devas lerni ilin. Sed en tre multaj kazoj ni aŭtomate scias la specon de verboi. Jen ekzemploj de la unua speco: preni, aĉeti, kaj trovi, ĉar oni ne povas preni aŭ aĉeti aŭ trovi se ne ĉeestas io por preni kaj aĉeti kaj trovi.

Marcel Leereveld.



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendas vin.

La 21a de Decembro estos la tria sabato. Venu al nia amikema kunveno.

Roger S



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Plantoj ankaŭ sentas kaj vivas

Mi tre ŝatis legi la informojn de Roger pri la plantoj . Ofte homoj decidas pri sia dieto kun la volo eviti kruelecon al bestoj kaj pravigas mortigon de plantoj per la fakto ke la nerva sistemo de plantoj ne estas tiom evoluinta . Ili eĉ opinias ke ili havas pli altan etikan nivelon ol viandmanĝantoj . Ĉu nun akceptebla pravigo? Ĉiu vivaĵo devas elekti: manĝi aŭ pere. Mi preferas pensi ke anstataŭ detruo / mortigado temas pri transformado. Iam mia korpo fariĝos gustoplena manĝaĵo por vermoj, kiuj siavice kontribuos al kreskado de aliaj bestoj . Tiamaniere mi fariĝos eterna.




Franciska Toubale



Bondezirojn kaj dankojn de UEA al ĉiuj aŭstraliaj esperantistoj.

Amike Renato Corsetti



ESTIMATAJ MARCEL LEEREVELD KAJ AŬSTRALIAJ PORESPERANTAJ AGANTOJ!

*En la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo ni
tutkore gratulas*

*PROFESORON MARCELL LEEREVELD
pro la 103-a vivojaro.*

*Benatajn proksimiĝantajn Festojn,
sanharmonion, pacon, belan veteron, interesajn travivaĵojn
ni deziras ankaŭ en la Nova Jaro 2020*

*Altestime kaj amike
D-rino Julinjo Farkas kaj D-ro Ludoviko Molnár*

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Aporismoj

Rimfabriko por nia sano

Mi kuretas aŭ fosas mian ĝardenon,
tiel malaltigas mian sangopremon.
Mi kuretas aŭ fosas mian ĝardenon,
malaltiĝas mia sangopremo.

Se la reno estas febla: fortigu Vin
mia kara.

Se malfortas miaj renoj, mi devas
hardi, trejni senhezite!

Mi anhelas, aer' mankas; mi
gimnastikas kaj montgrimpas.
Pulmoj miaj sonegas, la aero ne
sufiĉas: gimnastiku, pinton grimpu!

Mi toleras montgrimpadon:
malaltiĝis sangsukero kaj la graso.

Mi toleras montetgrimpon,
malaltiĝas sukero kaj grasogrado.

Dikeco kaj diabeto: ili estas
duonfratoj.

La dikeco kaj diabeto estas kiel
duonfratoj.

La korpa ekzerco estas vera
panaceo.

Jam scias Paŭlo, Bea: moviĝo estas
ĉion saniga.

Se Vi ne manĝegas, la tumoro Vin
evitas.

Se Vi ne tro plenigas la stomakon, ne
vizitos Vin tumoron.

Se manĝego ne estas Via moro, ne
alvenos la tumoron.

Se ne tropleniĝas la stomako, de Vi
kuros la tumoron.

La Budapeŝta Medicina Esperanto-
Fakgrupo tre dankas la esperantigon
al

D-ro Ludoviko Molnár, Kornélia
Nagy, Thierry Salomon

Mesaĝo

de nia Budapeŝta Medicina
Esperanto-Fakgrupo okaze
de la 19-a Internacia Medicina
Esperanto-Kongreso, Budapeŝto,
Hungario

**Kiuj estas la medioprotekta,
pedagogia kaj sanitara roloj de
Esperanto en la informadika
epoko?**

- **Ponto-lingva rolo:** Esperanto
helpas, ke la *tuthomara scio kaj
saĝo* atingu la interesigantojn.

- **Kapabloevoluiga rolo:** Esperanto
helpas la infanojn *lerni aliajn
lingvojn*, helpas la adoleskulojn
trovi amikojn en la mondo *surbaze
de lingva egalrajteco*, helpas la
plenkreskulojn pli efike *uzi* aliajn
naciajn *lingvojn*, riĉigante ilian
latinan-grekan, sciencan
vorttrezoron, kaj helpas la
triaaĝulojn trejnadi sian cerbon: –
*„kontraŭ kalkiĝo cerba
gimnastiko“*.

- **Egalrajta, komunumo-konstrua
rolo:** Esperanto helpas la
komunikadon *kaj persone kaj
interrete*; - ekzemple: ĝemelurbaj,
junularaj, sciencaj, artaj, sportaj
renkontiĝoj, ekonomiaj rilatoj...

Kun amikaj salutoj

D-ro Ludoviko Molnár
prezidanto

D-rino Julianna Farkas

respondeculo pri personaj kontaktoj

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Homo kaj Naturo

*La homo estas parto de l' naturo
kaj universo.
En pejzaĝo konstruita „nesto” ŝli loĝas.
Ili estas nia hejmo,
elformante unuecon.
Kiel zorgema dommaŝtro, ni gardas
kaj flegas, helpas la harmonion.*

JFLM



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Kvieteco en mia ĝardeno.

KIE ESTAS LA BIRDOJ ?

Dum la lastaj monatoj okazis ĉirkaŭ la domo multe da birdokantado dum la tuta tago, nun la birdoj ne plu kantas. Kial? Ĉu iu scias la tialon al mia kialo? Ĉu estas pro tio, ke ili nun prizorgas siajn nestojn kun ovoĵ aŭ birdidoj?

Marcel.



VIN MORTIGAS NEVIDEBLAJ VENENOJ.

Pere de sia respondeculo pri aerpolucio, la Esperantisto Jonathan Moylan, Greenpeace avertas pri la nevidebla mortiganto sulfuro dioksido, kiu mortigas precipe per kor- kaj pulmomalsanoj kaj demenco kaj fekundecproblemoj. Tiu veneno multas en Aŭstralio malpli ol nur en dek-unu aliaj landoj.

Marcel.

ARBARFAJROJ .

En la televidoprogramo “Demando kaj Respondo’ oni plendas, ke la aŭstralia registaro tre ne faras sufiĉe por malhelpi arbarfajrojn. Oni konsilas, ke la Registaro devos elspezi dekojn da miloj da dolaroj por tio. Mi proponas, ke ĝi ekhavu tiun monon impostante multe pli la preskaŭ nenion pagantajn riĉulojn kaj grandajn kompaniojn.

Marcel.

INVITO AL KRITIKO !

Ĉar el de nun mi proponas ke oni diskutu kaj ekzameni miajn tezojn pri la eŭropaj participoj kaj pri la miskomprenoj de la eŭropaj lingvistoj pri tio, mi ĉi sube klarigas tiujn miajn tezojn. Notu tamen la jenajn kvalifikaĵojn:

1e. Mi uzas ĉi tie la malmodernan participsistemon de Zamenhof uzatan de preskaŭ ĉiuj Esperantistoj. Mi do ĉi tie ne uzas la modernan Verban PasivanVoĉon per la sufikso “-ati”, kiel en “La hundo batatis de la viro”. La eŭropanaj miskomprenoj, kaj la esperantistaj konsekvencaj miskomprenoj, ja ne okazas ĉe la uzo de la moderna unuvorta Pasiva Voĉo.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

2e. Ĉar ekzemple en la angla la vorto “*work*” estas AŬ memstara Substantivo AŬ memstara Verbo, depende de la du malsamaj funkcioj indikataj de la vortetoj “*the*” kaj “*to*”, mi proponas ke ankaŭ la vorto “*sent*” estas AŬ Sentempa Pasiva Participo AŬ Pasinttempa Aktiva Participo, depende de la malsamaj funkcioj kun AŬ la helpverbo “*to be*” (esti) AŬ la helpverbo “*to have*” (havi). Alivorte: ekzistas en la angla (kaj aliaj etnaj lingvoj) du vortoj “*sent*” kun du malsamaj funkcioj depende de la kuna helpverbo, simile al la du vortoj “*work*”.

Bezoniĝas klare vidi kaj kompreni, ke la verba AKTIVA PASINTTEMPA PARTICIPO ESTAS AKTIVA KAJ PASINTTEMPA, KAJ KE LA verba SENTEMPA PASIVA PARTICIPO ESTAS SENTEMPA KAJ NUR PASIVA.

Estas klara, ke la Aktiva Pasinttempa Participo “*sent*” (sendita) estas ĉiam KAJ aktivvoĉa KAJ pasinttempa: “*sent*” kun “*havi*” NENIAM povas esti pasivvoĉa nek futurtempa. Por indiki la pasivan voĉon oni devus uzi la helpverbon “*to be*” (esti) kaj por indiki alian tempon oni devus forigi “*havas*”. Ni ĉiuj samopinias, ke la participo “*sent*” uzata kun “*to have*” havas la funkcion indiki la aktivan voĉon kaj la pasintan tempon.

Sed ni NE samopinias ke ekzistas alia participo “*sent*” kiu ne indikas tempon. Ni ĉiuj scias, ke tiu “*sent*” kun la helpverbo “*to be*” indikas la Pasivan Voĉon, sed la eŭropaj lingvistoj opinias ke tiu “*sent*” kun “*to be*” krome indikas la Pasintecon. Por indiki, ke ili malpravas, jen mia rezono. Se mi diras “*The letter will be sent at 4 o’clock*”, NENIEL ĉeestas indiko pri pasinta ago, nek pri alia tempo. Estas la verbo “*to be*”, kiu sole indikas ke temas pri la futura tempo. Ĉar okazas nur unu ago, la tempon indikas nur unu verbo, nur unu ago, nome “*will be*”. Tio sufiĉas. Cetere, se la verbo “*sent*” en la futuro havus iun tempon, ekzistus ĉi tie du agoj. Do ĉi tie la vorto “*sent*” estas Sentempa Pasiva Participo. La samo okazas en la Prezenco. En la frazo “*The letter is sent just now*” ekzistas neniel iu indiko pri pasinta ago, do “*sent*” ne povas indiki la pasintecon. Ĝi neke povas indiki alian tempon, ĉar temas pri nur unu ago en la prezenca tempo, indikita en la prezenca verbo “*is*” (“*is being*”). Do ankaŭ en la prezenca tempo la participo “*sent*” indikas nur la pasivecon, neniel la tempon. Io simila okazas ĉe la pasinta ago, en “*At 2 o’clock the letter was sent*”. La tempo de la nur unu ago estas indikata en la helpverbo “*was*”, kaj NE en la participo “*sent*”, kiu indikas nur la pasivecon de la ago, de la unu ago. Se tiu “*sent*” indikus la pasintan tempon, ekzistus en ĉi tiu frazo du agoj en la pasinteco Tio estas nomata la Pluskvamperfekto. Konsekvence, kun “*to be*” la participo ĉiam indikas nur la pasivecon kaj tial nomiĝu la “*Passive Participle*”, la Pasiva (sentempa) Participo. Ĝi havas tute alian funkcion ol la Pasinttempa Participo “*sent*” en “*has sent*”. Sekve ekzistas en la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj tri Participoj.

Krome ekzistas en la eŭropaj lingvoj Perfekta Tempo indikata per du verboj: unu estas la helpverbo “*to have*”, “*havi*”, kaj la dua estas la Pasinttempa Participo “*sent*”. La unua ago, “*have*”, indikas la nunan rezulton de pasinta ago, kaj la dua, “*sent*”, indikas la estintan agon “*sendi*”. Ĉi tie la unua ago, “*to have*”, havas la prezencan formon “*havas*”, kaj la dua ago indikas la pasintan tempon en la participo “*sent*”, kies funkcio do estas Pasinttempa, kaj krome Aktivvoĉa. Do tre klaras, ke ekzistas en tiuj eŭropaj lingvoj tri malsamsignifaj participoj.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La supre ekzamenita situacio parte montriĝas ankaŭ, kiam oni ŝanĝas de unu Gramatika Voĉo al la alia. Farante tion, la strikta regulo estas ke ĉe tiu ŝanĝado la tempo de la ago(j) restas ĉiam la sama en la du Voĉoj. Observu “*We sent the letter at 2 o’clock*” en la Aktivo (“Ni sendis la leteron je la dua”), kies Tempo estas la Preterito. La Pasivoĉa do devas esti ankaŭ la Preterito, do “*The letter was sent at 2 o’clock*” (“La letero estis sendata je la dua”): “*Was (being) sent*” estas la unuaga Pasinta Tempo Pasiva, en Esperanto Zamenhof’a “estis sendata”.

Por eŭropanoj ne gravas, ĉu ili scias aŭ ne ke en tiu situacio temas pri du malsamfunkciaj participoj, la Pasinttempa kaj la Pasiva. Sed tiu fakto konfuzas la eŭropajn Esperantistojn, ĉar ili devas traduki el verba eŭropa Pasivo kun “esti” al adjektiva Esperanta Pasivo kun “esti”. Ili tial tradukas, malĝuste, “*The letter was (being) sent*”, kun Sentempa participo, al Esperanta “Pasinttempa Participo” kun “estis” kaj “sendita” ambaŭ indikantaj pasintan tempon, do pluskvamperfekton. Ĉiuj Esperantistoj faras tiun eraron, ĉar neniu scias ke la eŭropaj lingvoj havas trian, sentempan, participon, kaj ili malĝuste vidas du pasintajn tempojn (“-is ita”) kie estas nur unu (“-is ata”). Nur tiuj malmultaj kiuj jam uzas la modernan Verban Pasivan Voĉon ne povas fari la eraron ĉar ili uzas la sentempan sufikson “-ati” por ĉiuj tempoj kaj indikas la tempon nur en la finaĵoj –as, -is, aŭ –os.

Mi humile petas pruvitan refuton de la ĉisupro.

Marcel Leereveld.

PLIA EŬROPA PROBLEMO.

Alia eŭroplingva problemo apenaŭ estas problemo por la eŭropanoj mem, sed nur por la Esperantistoj. Ĝi estas la malrapidega ŝanĝiĝo de la simpla pasinta tempo. La eŭropaj lingvistoj plene scias pri ĝi, kvankam ili tendencas silenti pri ĝi, escepte en Francujo. La ordinaraj eŭropanoj ne scias pri ĝi, sed tio ne gravas, ĉar ili aŭtomate uzas la lingvon de la antaŭa generacio kaj dume iomete puŝas la ŝanĝon. Por Esperantistoj ĝi estas problemo, ĉar ili ne havas, ne povas havi, tian ŝanĝon en sia lingvo Esperanto. Do ili devas scii, kio ekzakte signifas la eŭroplingvaj formoj de ties pasintaj tempoj.

La ŝanĝo okazas jam dum kelkaj jarcentoj, kaj estas jam kompleta en la parolata franca lingvo, kaj duonvoje en la ĝermanaj lingvoj sed nur kvaronvoje en la angla. Ĝi konsistas en la fakto, ke la parolantoj pli kaj pli uzas la Perfektan Tempon por indiki la agojn kiuj estas en la simpla pasinta tempo, la Preterito, kaj dume uzas tiujn verbojn en la signifo de la Preterito. Ekzemple por la frazo “*Ŝi matenmanĝis hodiaŭ el de la sepa ĝis la oka*”, oni nun tendencas uzi, depende de la lingvo, pli kaj pli la formon “*Ŝi estas matenmanĝinta hodiaŭ el de la sepa ĝis la oka*”, en sia etna lingvo, kun la helpverbo “havi”. La francoj nun uzas nur “*Ŝi estas manĝinta*” (“*Elle a mang’ée*”), la angloj nur okaze (“*She has eaten*” anstataŭ “*She ate*”), kaj la aliaj ĝermanoj ofte, kaj pli kaj pli. Konsekvence en tiuj lingvoj la Perfekta Tempo uzatas kun KAJ la signifo de la Perfekta Tempo KAJ de la Preterita Tempo. Eĉ tio ne multe gravas, escepte se oni parolas Esperanton kaj devas scii kiun el la du Tempoj uzi. Eltrovi tion estas malfacila eĉ por profesiaj lingvistoj. Multaj ordinaraj Esperantistoj konscias pri tio kaj, ĝuste aŭ malĝuste, tendencas uzi la pli mallongan Preteriton en Esperanto anstataŭ la Perfektan Tempon. Aliaj Esperantistoj faras la samon, sed intuicie.

Mi ne havas specialan opinion pri tio. Kion vi pensas pri ĉi tiu afero?

Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Trimonata agadraporto de ACM Benino.

Post la unua etapo pri la projekto "Volontula-Instruado de Eo en Afriko", Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino lanĉis alvokon por varbi sian duan volontulon, kiu deĵoros dum dek monatoj. Nia samideano, Cyprien AGUIYA, estis akceptita inter la ricevitaj kandidatiĝoj kaj ekdeĵoris septembre konforme la planitan kalendaron de ACM Benino. Septembre la volontulo Cyprien, en diversaj gimnazioj, renkontis la studentojn en la universitato en Lokossa



antaŭ ol gvidi kursojn. Tri gimnazioj favore akceptis la enkondukon de Esperanto en tiuj lernejoj, nome CEG Koudo, Collège la Réussite kaj le Complexe Enfants Adolescents Epanouis. En E.A. Epanoui, Esperanto estas akceptata kiel lernofako kaj instruadiĝas ĉiujn mardojn. En la gimnazio la Réussite, tie la kurso ne stabiligis pro la ne taŭga horaro de la lernejaj profesoroj (instruistoj). La lernejestro promesis al ni ordigi la horaron por ke la esperanto-kurso stabiligu en la

gimnazio.

En la centro, la volontulo regule gvidas la kursojn merkrede kaj sabate konforme la tempon de esperanto-lernantoj. La instruado de la lingvo baldaŭ komenciĝos kun la studentoj en la loka universitato.



La unua etapo de la projekto pasintjare estis subvenciita de Fernando Maia, kiu estas la motoro de la projekto.

ACM kaj Fernando multdankas Esperantoinfon kaj Esperantoplus, kiuj volonte subvenciis la projekton po 1030€ por kovri la lukoston kaj la vivsubvencion de la volontulo, Cyprien AGUIYA. La duono de tiu subvencio sendiĝis por ekplenumi la agadojn.

Menciindas la helpo de SAT-Amikaro kaj Leif Nordenstorn materiale por facile plenumi la

instruadon. Cyprien estas organizanta la Zamenhof-tagon, kiu okazos la 18an de decembro.

Raportis,
François Hounsounou,
La fondinto de ACM- Benino.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Malfacilaĵoj de la Angla Lingvo

Multaj homoj tre bone parolas la anglan kiel fremdan lingvon. Tamen, eĉ por ili, la angla prezentas malfacilaĵojn, interalie pro ĝia **grandega vortprovizo** kaj ĝia **komplika sintakso**. Tion rimarkigas de tempo al tempo S-ro Marcel Leereveld, en liaj pensigaj artikoloj pri lingvaj aferoj.

Grandega Vortprovizo

Kiam mi studis la germanan en universitato, antaŭ pli ol kvindek jaroj, agrabla juna germana lekciisto instruis mian tradukan klason. Li parolis la anglan flue, kun aristokrata prononcmankio, kvazaŭ la angla estus lia unua lingvo. Tamen, neeviteble, ekzistis truoj en liaj anglalingvaj scioj kaj spertoj. Ekzemple, en unu klaso, ni tradukis germanan fabelon. Subite, li alparolis min.

Li: Kion signifas [la germana vorto] *Spiegel* (spegulo)?

Mi (senhezite): *Looking glass* (spegulo).

Li: Tute ne, ĝi signifas *mirror* (spegulo)!

Mi (surprizite): *But a looking glass is a mirror.*

(Sed *looking glass* ja estas spegulo.)

Feliĉe, kvankam li senintence malobeis fundamentan **tradukan** regulon—ke fremdlingvano ne miskorektu lingvaĵon de persono parolanta sian propran lingvon—tamen li ĝentile akceptis mian klarigon sen neutila argumentado. Mi ankaŭ montris detenemon, ne aldonante, ke ne ĉiu spegulo estas *looking glass*, ĉar ne ĉiu spegulo estas vitra kaj ne ĉiu spegulo estas ilo por sin rigardi. Ekzemple, en aŭtomobilo, retrospegulo ne estas *looking glass*; sed la speguleto sur la dorso de kontraŭsunbrila viziero, la angle nomita *vanity mirror* (spegulo por rigardi kaj admiri sian vizaĝon), ja estas *looking glass*.

Pro tiaj lingvaj truoj kaj eraroj, oni povas malkaŝi fremdajn spionojn. Se mia juna lekciisto estus spiono, tion rapide eltrovus sperta pridemanda oficisto. Ĉar en tiu periodo—la sesdekaj jaroj—ĉiu altklasa brita anglalingvano ja sciis, kio estas *looking glass*. Krome, tiu vere anglalingva termino ofte uziĝis en fabeloj, kiujn infanoj de ĉiuj sociaj klasoj aŭskultis kaj legis, kvankam anglalingvaj burĝoj (mezklasanoj) ĝenerale ne uzis tiun terminon en interparolado, preferante la francdevenan vorton *mirror* (france *miroir*).

Simile,

aristokratoj emis diri (*table*) *napkin*, *graveyard*, *lavatory/loo*, *sitting room*, *sofa*;
dum

burĝoj emis diri *serviette*, *cemetery*, *toilet*, *lounge*, *settee*.

Sintaksaj Kompleksaĵoj

S-ro Leereveld donis ekzemplon de tiu problemo en AE-453. Mi citas:

... se mi nun atendas la aŭtobuson kaj atendis jam dek minutojn,
la angla ne ŝatas diri

I wait here for ten minutes,

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

sed uzas prefere la **daŭran tempon**, la imperfekton

I am waiting for ten minutes (mi estas atendanta dum dek minutoj).

Tiu ekzemplo ilustras malfacilaĵon de la angla por neanglalingvanoj. Fakte, **en tiu situacio**, anglalingvanoj ne nur “ne ŝatas diri” *I wait here for ten minutes*, ili tute ne dirus tion (krom se ili dezirus indiki—tre malprobable—ke ili ĉiam atendas ĉi tie nur dum dek minutoj kaj tuj poste ĉesas atendi ĉi tie, ekzemple por atendi aliloke, aŭ por eniri la aŭtobuson kiu ĉiam alvenas precize je la fino de tiuj dek minutoj).

Estas prave, ke anglalingvanoj uzus **prezencan daŭran tenson**, sed **ne** la formon proponitan:

I am waiting [here] for ten minutes.

Nur fremdlingvano dirus tion.

Anglalingvanoj dirus

I've (I have) been waiting [here] for ten minutes.

Simile en la hispana, oni povas diri

He estado esperando aquí diez minutos.

En la sama artikolo, S-ro Leereveld donas pluan ekzemplon. Mi citas:

Krome en la angla lingvo oni ofte preferas uzi la imperfekton, la nefinitan tempon, por simple esprimi la finitan prezencan:

It is four o'clock now.

I am normally eating at six o'clock, but to-day I am eating at five.

Ree, tiu ekzemplo montras, ke la parolanto ne estas anglalingvano. Anglalingvano dirus:

It is four o'clock now.

(Nun estas la kvara horo.)

I normally eat (tenso prezenca rutina aŭ kutima) *at six o'clock,*

(Kutime mi manĝas je la sesa,)

but today I'm eating (aŭ *I'll be eating*) *at five.*

(sed hodiaŭ mi manĝos je la kvina.)

Aliaj eblecoj, kun diferencaj nuancoj, estas

but today I'll eat at five

kaj eĉ

but today I eat at five,

(sed hodiaŭ, laŭplane, mi manĝos je la kvina,)

catch the train at six...and get to my hotel at ten.

(trafos la vagonaron je la sesa...kaj alvenos al mia hotelo je la deka.)

En antaŭa artikolo (AE-431), S-ro Leereveld diris:

I WILL BE EATING at 6h00 – Mi MANĜOS je la sesa

En tiu frazo, la sintakso estas normala. La sola indikaĵo, ke li estas fremdlingvano, estas, ke li skribis *6h00*.

Por la horo, anglalingvano skribus, ekzemple:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

at 6 o'clock (in the morning aŭ evening)
at 6.00am (matene) aŭ 6.00pm (vespere)
at 0600 hours (matene) aŭ 1800 hours (vespere)

Tiun frazon S-ro Leereveld sekvigas per plua frazo, kiun anglalingvano ne dirus, kaj sentus iel stranga:

I HAVE LOST my watch when in Rome – Mi PERDIS mian horloĝon en Romo

Kutime, anglalingvano simple dirus:

I have lost my watch.
I lost my watch in Rome.
I lost my watch when I was in Rome.

Malhelpa Ĝentileco de Bonvolemaj Anglalingvanoj

Pro ĝentileco, anglalingvanoj bonvolemaj kaj kompetentaj emas ne korekti la lingvaĵon de alilingvano parolanta la anglan kiel fremdan lingvon.

Oni komprenas, ke la angla povas esti malfacila. Oni scias, ke ne ĉiu anglalingvano mem parolas la anglan ĉiam perfekte. Simile, oni ne insistas, ke ĉiu fremdlingvano parolu ĝin senerare. Plejofte, malgraŭ iuj problemoj, oni povas percepti la intencatan signifon; se ne, oni povas fari afablajn demandojn por eltiri klarigon.

Tamen, tia sin detenado estas kritikebla. Ĉar tiel oni malhelpas fremdulojn, kiuj deziras perfektigi sian anglalingvan kapablon.

Vilĉjo Aldridge

Zamenhof-festo en Adelajdo



La 14-an de decembro 16 adelajdanoj kunvenis en la hejmo de Indrani Beharry-Lall por celebri la 160-an naskiĝtagon de L.L.Zamenhof.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

